

## MIA „PATRO NIA”

Franciscs Józsefné (Hungario)

Kiam via koro jam triste troplenas,  
Kiam vin viziti jam nenio venas,  
Kiam vian vivon nigra nubo kovras,  
Kiam la amatoj pri vi ne plu zorgas,  
Ho „animo”, neniel malesperu,  
Supren rigardu, obstine esperu,  
Preĝante: \* PATRO NIA, KIU ESTAS EN  
LA ĈIELO,\*

Kiam vi sentas vin sola en la mondo,  
Al demandoj viaj ne venas respondo,  
Kiam ĉirkaŭas vin aĉa vort-inundo,  
Blasfemas la Malbon’ Dion kiel hundo,  
Ho „animo”, ne lasu vin trompi,  
Supren rigardu, por la sorĉon rompi:  
Sinjor’, \*SANKTIGATA ESTU VIA  
NOMO.\*

Kiam la Malbono regas jam la Teron,  
Kaj la mensogaro subpremas la Veron,  
Kiam eĉ tutglobe estiĝas Infero,  
Kaj la homojn signas Kaina fajra fero,  
Ho „animo”, ne laciĝu, ne kapitulacu;  
Supren rigardu, al lumo eterna,  
Kaj petu: Sinjor’, \*VENU VIA REGNO.\*

Kiam vin turmentas la morna realo,  
Kiam malaperas ĉiu idealo,  
Kiam vi suferas pro nervoza febro,  
Kiam amikeco iĝas nur funebro,  
Ho „animo”, ne kolapsu, ne amariĝu!  
Supren rigardu, al la nub-tavolo,  
Kaj diru: Sinjor’! \*FARIĜU VIA VOLO  
KIEL EN LA ĈIELO, TIEL ANKAŬ SUR  
LA TERO.\*

Kiam malriĉuloj sparadas monerojn,  
Kiam vi konstatas altiĝi la prezojn,  
Kiam la riĉuloj havas milionon,  
Dum la malriĉuloj eĉ ne la milonon,  
Ho „animo”, gardu la koran kuraĝon,  
Supren rigardu, preĝ-movu la manon,  
Kaj petu: Sinjor’ \*NIAN PANON  
ĈIUTAGAN DONU AL NI HODIAŬ\*

Kiam pri la vivo vi jam tro-laciĝas,  
Kiam via kredo jam forvaporiĝas,  
Kiam preĝi mankas kaj emo kaj forto,  
Kiam Lin nei altrudiĝas vorto,  
Ho „anim”, vin gardu! Nepre ne konsentu!  
Supren rigardu, al Dio vin donu:  
Sinjor’, helpu! \*KAJ PARDONU AL NI  
NIAJN ŜULDOJN,\*

Kiam vi kredis esti estimota,  
Kaj ankaŭ loĝejo estis ricevota,  
Ĉio via tasko estis plenumita,  
Sed nun vi jam scias esti fi-uzita,  
Ho „animo”! Ne koleru, ne malfidu:  
Supren rigardu, al Dio vi konfidu:  
Sinjor’! \*KIEL ANKAŬ NI PARDONAS  
AL NIAJ ŜULDANTOJ.\*

Kiam grandpotencoj pri paco parolas,  
Sed fakte - mortigi, pereigi volas,  
Kiam ili ĉion klopodas konkeri,  
Kiel tion, Patro, vi povas toleri?!  
Ho „animo”! ne ribelu, ne frustriĝu;  
Supren rigardu, kaj faru atenton:  
Sinjor’! \*KAJ NE KONDUKU NIN EN  
TENTON, SED LIBERIGU NIN DE LA  
MALBONO, AMEN!\*

### EPILOGO

\*

Kaj tiam ekparolas la Majstro, severe sed  
milde:  
For, Satano! Ĉesu ĉiu vento!  
Estu PACO kaj SILENTO!  
\*

Kial vi timas, etfiduloj?  
FIDU! Ja mi promesis al vi,  
Ke la infero ne povas vin venki!  
Ho, fidela grego, jen mi, la Pastoro,  
Kiu restos kun vi, ĝis la lasta horo!\*

*Tradukis el la hungara Prof. E. Dudich,  
5-an de julio 2008*